

Ĉeĥio

Saluton sinjoro Jasuo.

25.12

hipersonikaj raketoj pafitaj de Belarusio atakis Kijivon kaj apuda ĉirkauaj^o kaj 473 Sahedoj. Preskau duono de la urbo restis sen elektro energio, akvo kaj hejtado. 40 homoj estis vunditaj (du infanoj). Du homoj mortis. 2 multetag^{aj} domoj kaj 12 domoj privataj estis detruitaj, 20 privataj autoj, garag^{oj}, elektrocentrejo estas difektita. 10 malsanulejoj funkcias nur per energio de generatoroj.

En Bílá Cerkva elektroenergio malaperis en 6 distriktojn, 28 homojn estis vunditaj. Urbon Slavjansk atakis 3 aviabomboj, kaj Šahedoj, 40 privataj domoj estas difektitaj. Urbon Druj[^]kivka milit'dronoj Geran' atakas ĉiutage, civil'uloj mortas en apudaj vilag^{oj}, mankas akvo kaj mang^{aj}^o, hejtado, Kramatorsk, Sumy, Poltava, senĉese atakitaj, Umanj, 500 domoj estas difektitaj, 9 detruitaj tute, Dnipro, Harkiv ĉiutage sonas alarmoj. Hierau raketoj atakis Odeson, en urbo aperis multnombraj incendioj, 10 homoj estis vunditaj, inter kiuj estis bebo.

EU daurigas restriktojn pór RF je duonjaro.

Grupo de rusaj agentoj rete atakis francan poŝton. Rusaj raketoj difektigis ŝipon sub slovaka flago.

En Danio, Hispánio, Germanio, Litovio, Pollando aperis rusaj spionaj dronoj.

Litovio kaj Latvio deiras de konsento pri minoj.

Latvio starigis barilon en limo ĉe Rusio.

Kanado aldonas al Ukrainio helpon je 2,5 miliardojn da dolaroj.

Ukrajnajn dronoj ekbruligis rafinerion en rusa Syzranj.

En Europo eble plej populara kristnaska kanto estas Paca nokt'.

<https://share.google/yFyROk56lLH9o74tP>

Kiam mi audas kanton Paca nokt', mi pensas, ke Europo ankoraŭ povas g[^]oji pri pacaj noktoj, sed neniŭ scias kiel longe. Olga

チェコ共和国

ヤスオさん、こんにちは。

12月25日

ベラルーシから発射された極超音速ミサイルがキエフとその周辺地域、そしてシャヘド地区 473 か所に着弾しました。市のほぼ半分が電気、水道、暖房の供給を停止しました。負傷者は40人（うち子供2

人)、死亡者は2人でした。2棟の高層ビルと12戸の民家が破壊され、乗用車20台、ガレージ、発電所が被害を受けました。10の病院は発電機のみで稼働しています。

ビーラ・ツェルクヴァでは、6つの地区で停電が発生し、28人が負傷しました。スラビャンスク市は3発の空爆を受け、シャヘドでは民家40戸が被害を受けました。ドルイキフカ市はゲラシコ軍の無人機による攻撃を毎日受けており、近隣の村では民間人が死亡し、水、食料、暖房が不足しています。クラマトルスク、スムイ、ポルタヴァは絶え間なく攻撃を受けています。ウーマニでは500戸の家屋が損壊し、9戸は完全に破壊されました。ドニプロとハリコフでは毎日警報が鳴っています。昨日はオデッサがロケット弾攻撃を受け、市内で多数の火災が発生し、乳児を含む10人が負傷しました。

EUはロシアへの制限を6か月延長しました。

ロシアの工作員グループがフランスのメールをオンラインで攻撃しました。ロシアのミサイルがスロバキア国旗を掲げた船舶に損害を与えました。

ロシアの偵察用無人機がデンマーク、スペイン、ドイツ、リトアニア、ポーランドに出現しました。

リトアニアとラトビアは地雷に関する合意から離脱しました。

ラトビアはロシアとの国境にフェンスを設置しました。

カナダはウクライナへの支援を25億ドル追加しました。

ウクライナのドローンがロシアのシズランにある製油所に放火しました。

ヨーロッパで最も人気のあるクリスマスソングは、おそらく「きよしこの夜」でしょう。

<https://share.google/yFyR0k56lLH9o74tP>

「きよしこの夜」を聴くと、ヨーロッパはまだ平和な夜を楽しめるだろうと思いますが、それがいつまで続くかは誰にもわかりません。オルガ

2026.1.1 Ukrainio

Kara s-ro Jasuo!

Mi kore gratulas Vin kun la Nova Jaro kaj sincere deziras al Vi kaj Via familio bonan sanon, feliĉon, ĝojon kaj ĉion plej bonan en la Nova jaro.

Kun novjara esperanta saluto,
D-ro Igor Galaychuk,
Ukrainio

P. S. Mi sendas al Vi freŝan numeron de Ukraina Stelo, kiu enhavas informojn pri la bombado de mia urbo Ternopilo fare de la rusoj (19-a Nov. 2025) kaj pri la Medicina Esperanta Konferenco (IMEK) en 1995 jaro, kiu mi organizis tiam.



UkrStelo- N4
2025.pdf

2026 年 1 月 1 日 ウクライナ

ヤスオ様

新年おめでとうございます。あなたとご家族の健康と幸せ、喜び、そして素晴らしい新年をお祈りいたします。

エスペラント語で新年のご挨拶を申し上げます。

イゴール・ガライチュク博士

ウクライナ

追伸：ウクライナ・スター誌の最新号をお送りします。この号には、ロシア軍による私の街テルノーポリへの爆撃（2025 年 11 月 19 日）と、私が当時主催した 1995 年の医学者エスペラント大会（IMEK）に関する情報が掲載されています。

2023.1.3 Honkongo

Kara Jasuo,

Mi legis la retpoŝton "Voĉoj de la Mondo", kiun vi sendis dum Silvestro. La letero de Olga estis, por esti rekta, intensa. Dum mi pripensis la seriozajn situaciojn de la mondo, mi rememoris la vortojn de Tony Robbins: "Kien iras fokuso, tie fluas energio. Kaj kie fluas energio, tie kreskas ĉio, kion vi fokusas." Kaj kiel vi skribis, "Ĉi tio povus esti ŝarĝo ricevi, se jes, pardonu pri tio," mi sentas, ke vi tradukis ĉi tion el Esperanto al la japana kaj metis ĝin en du lingvojn en viajn "Voĉojn de la Mondo" kun peza koro. Hieraŭ vespere, mi scivolis pri la pensmaniero, kiu kreas ĉi tiujn katastrofojn, kaj ĉu ekzistas io, kio povas ŝanĝi ĝin.

Kiam Apollo 11 alteriĝis sur la Lunon, mi estis kvinjara. La nove malkovrita "kosma" perspektivo estis tiel sensacia, ke ĝi certe enpenetris min dum mi kreskis. Mi amas iri al la planetario kaj legi librojn de astronautoj.

"Tio estas unu malgranda paŝo por la homo, unu giganta salto por la homaro." – Neil Armstrong (Apollo 11, 1969)

"Ni venis tiom ĉi por esplori la Lunon, kaj la plej grava afero, kiu okazis, estas ke ni malkovris la Teron." – William Anders (Apollo 8, 1968)


La aldonita bildo estas la fama foto de "Earth Rise" prenita de astronauto de la Luno.

"Por tiuj, kiuj estis en la kosmo, kaj por la centoj kaj eble miloj pli, kiuj estos, la sperto certe ŝanĝas vian perspektivon. La aferoj, kiujn ni dividas en nia mondo, estas multe pli valoraj ol tiuj, kiuj dividas nin." - Donald Williams (Kosmopramo, 1985)

"Se vizitanto venas sur la stacion, la unua afero, kiun mi farus, estas konduki lin al la granda fenestro, por ke ni povu vere vidi nian Teron... Por kompreni ĝian Grandiozon, ĝian grandegan potencon, ĝian grandecon, ĝian ruliĝantan belecon, kaj ankaŭ ĝian enecan fragilecon.

Ĉi tio estas mirinda, mirinda homa sperto. La sola afero, kiu kolerigas min, estas ke mi devas dormi." – Chris Hadfield (Kosmostacio, 2013)

La Superrigarda Efiko estas la kogna ŝanĝo, kiun astronautoj spertas rigardante la Teron



el la kosmo: nia planedo aspektas delikata, bela kaj interkonektita, kaj limoj ŝajnas malpli centraj konsiderante nian komunan homaron.

La ideo kunpreni mondgvidantojn por sperti ĉi tion estis proponita por stimuli tutmondan kunlaboron kaj daŭrigeblan pensadon. Sed ĝi ne estas praktika por ĉiuj. Alternativoj inkluzivas mergan virtualan realon (VR), pripenseman edukadon kaj kultivadon de pli larĝa kosma pensmaniero por plilarĝigi perspektivojn. Multaj organizoj laboras por traduki tiun kosmo-bazitan vidpunkton en Ter-bazitan agon per kuraĝigo de empatio kaj komuna respondeco inter influaj figuroj.

Mi pensis, ke mi kunhavigos ĉi tiujn miajn pensojn kun vi, dezirante al vi kaj Tamae bonegan jaron 2026.

Kumi

2026.1.3 香港

ヤスオ様

大晦日にお送りいただいた「世界の声」メールを拝読しました。オルガさんの手紙は、率直に言って、胸を締め付けられるものでした。世界の深刻な状況を思い返し、トニー・ロビンズの言葉を思い出しました。「焦点が向くところにエネルギーが流れる。そして、エネルギーが流れるところに、あなたが焦点を当てるものは成長する」。そして、「もしお受け取りになって重荷になるようでしたら、お詫び申し上げます」とお書きになったように、あなたはこのメールをエスペラント語から日本語に翻訳し、「世界の声」に2国語で掲載されたことを、深い悲しみとともに感じました。

昨夜、私はこうした災難を生み出す心構え、そしてそれを変えることができるものはあるのだろうかと考えました。


アポロ 11 号が月面に着陸した時、私は 5 歳でした。そこで新たに発見した「宇宙」という視点は、あまりにも壮大で、成長するにつれて私の中に深く浸透していったに違いありません。私はプラネタリウムに行くことや、宇宙飛行士の本を読むことが大好きです。

「これは人間にとっては小さな一歩だが、人類にとっては偉大な飛躍だ。」— ニール・アームストロング (アポロ 11 号、1969 年)

「我々は月探査のためにここまで来た。そして最も重要な出来事は、地球を発見したことだ。」— ウィリアム・アンダース (アポロ 8 号、1968 年)

添付画像は、宇宙飛行士が月から撮影した有名な「地球の出」の写真です。

「宇宙に行ったことがある人、そしてこれから行く何百人、あるいは何千人もの人にとって、この経験は確かにものの見方を変えるでしょう。この世界で私たちが共有しているものは、私たちが隔てるものよりもはるかに価値があります。」— ドナルド・ウィリアムズ (スペースシャトル、1985 年)



「もし宇宙ステーションに訪問者が来たら、まず最初に大きな窓へ連れて行き、地球を実際に見てもらいます。地球の壮大さ、計り知れない力、広大さ、うねる美しさ、そして同時に、地球に内在する脆さを理解するためです。これは実に素晴らしい、素晴らしい人間体験です。ただ一つ腹立たしいのは、眠らなければならないことです。」 - クリス・ハドフィールド（スペースステーション、2013 年）

オーバーサイト効果とは、宇宙飛行士が宇宙から地球を眺めたときに経験する認知的変化です。地球は脆く、美しく、互いにつながっているように見え、国境は私たちが共有する人間性にとってそれほど重要ではなくなるように思われます。

世界の指導者を集めてこの体験をするというアイデアは、世界的な協力と持続可能な思考を促進するために提案されました。しかし、これは誰にとっても現実的ではありません。代替案としては、没入型仮想現実（VR）、内省的教育、そして視野を広げるためのより広い宇宙的マインドセットの育成などが挙げられます。多くの組織が、影響力のある人々の間で共感と責任の共有を促すことで、この宇宙的な視点を地球規模の行動へと転換しようと取り組んでいます。

あなたとタマエさんにとって素晴らしい 2026 年になりますよう、この思いを皆さんと共有したいと思います。

久美

香港

2026 年 1 月 3 日

2026.1.5 Francio

Ĉu al la kvara Imperio germana ?

verkita de *Éric Bernard COFFINET*

je la 01a de januaro 2026

Antonio GRAMSCI (1891-1937) skribis ke, "mortiĝanta estas la malnova mondo, malfrue naskiĝanta estas la nova mondo kaj en tiu duonlumo ekaperas monstroj". Kaj li aldonis ke, "la krizo estas momento kiam la malnova mondordo svenas kaj kiam la nova devas sin trudi spite al ĉiuj kontraŭstaroj kaj kontraŭdiroj. En tiu fazo de transiro okazas ja multaj eraroj kaj turmentoj". Nun en kriza tempo, ĉu oni devas timi aperon de kvara Imperio germana ?

La unua Imperio (*Reich* : Rajŝ') estis la Sankt-Imperio romana germana (962-1806) kun jam ekde la dekdua jarcento la germana koloniado de la orienta Eŭropo (*drang nach osten* : impeto al oriento). La venkoj de la unua Imperio franca de Napoleono la Unua kaŭzis ĝian malaperon.

La dua Imperio germana (1871-1918) fondiĝis la 18an de januaro 1871 per unuiĝo de la germanaj Ŝtatoj ĉirkaŭ Prusio post ĝia venko kontraŭ la dua Imperio franca de Napoleono la Tria. Ĝia agresema politiko industria kaj tutgermanisma al la orienta Eŭropo, kie jam vivis grandaj komunumoj germanaj, estis unu el la kaŭzoj de la unua mondmilito. Per la packontrakto de *Brest-Litovsk* subskribita la 3an de marto 1918 la bolŝevisma Rusio portempe fordonis vastajn teritoriojn deziritajn, kiuj nuntempe estas ukrainaj, belarusaj, polaj, baltaj aŭ eĉ finlandaj.

Post la armistiko je la 11a de novembro 1918 Francio volis dispecigon de tiu germana Imperio, same kiel estis dispecigitaj la imperioj aŭstra-hungara kaj otomana, por definitive malfortigi ĝin. Tion malkonsentis la potencoj britaj-usonaj, kiuj helpadis la germanajn industriojn kaj poste favoris la naziismon por lukti kontraŭ Unuiĝo de Sovetaj Socialismaj Respublikoj (U.S.S.R). Dank'al ili kaj spite al la kondiĉoj armisticaj tiu tria Imperio germana (1933-1945) povis sin fortege rearmigi, reakiri la regionon de Rejnlando, kaj daŭrigi sian tutgermanisman disvolviĝon per invado unue de Aŭstrio, poste de la ĉefaj Sudetoj kaj fine de la okcidenta Pollando, kiu estis kaŭzo de la dua mondmilito. La provo disvolviĝi plu orienten laŭ Ĝenerala plano por Oriento (*Generalplan Ost*) per milito kontraŭ U.S.S.R fine kaŭzis ĝian plenan malsukceson kaj dispecigon de Germanio al du landoj regitaj de la venkintoj.

La "sennaziismigo" de okcidenta Germanio fakte limiĝis je la proceso de Nurenbergo

kaj kelkaj "procesoj sekvintaj", dum kiuj nur ĉirkaŭ dekmil homoj estis kondamnitaj ! La potencoj britaj-usonaj enoficigis eks-naziistojn subigitajn al ili ĉe ĉiuj niveloj de Federacia Respublika Germanio (F.R.G) kaj de Nord-Atlantika Traktat-Organizo (N.A.T.O) ambaŭ fonditaj en 1949 por daŭrigi sian "malvarman militon" kontraŭ U.S.S.R-o kaj ties satelitaj landoj komunistaj. Same okazis por Eŭropo konstruita kiel usona kolonio kaj kies unua prezidanto de la eŭropa Komisiono, *Walter HALLSTEIN* (1901-1982), estis komisiita en 1938 de Hitlero por starigi la jurajn bazojn de "nova Eŭropo" regota de Germanio ! Nenio do ŝanĝiĝis en la germanaj regad-retoj subtenataj de Usono fronte al komunismo...

Laŭ la kondiĉoj de la kontrakto subskribita en Moskvo je la 12a de septembro 1990 por la renuiĝo de siaj partoj okcidenta kaj orienta, Germanio devas havi paceman politikon kaj malgrandan armeon sen armiloj nukleaj, biologiaj aŭ kemiaj. Ankaŭ oni parole promesis al Rusio ke N.A.T.O ne plu disvatiĝos orienten. Germanio fine reakiris sian unuecon, sian potencon kja sian influon en Eŭropo dank'al la protekto de la "usona ŝildo", abunda rusa gazo malmultekosta kaj komuna monunuo favoraj al siaj industrioj.

Sed ĉio subite ŝanĝiĝis post la neatendita malvenko de Usono kaj N.A.T.O kontraŭ Rusio en Ukrainio. Post kiam Usono detruigis la gasodukton *Nord Stream* kaj trudis al Eŭropo malsaĝajn punojn komercajn kontraŭ Rusio, ĝi nun volas forlasi la batalkampon eŭropan por alfronti Ĉinion. Sekve usona protekto por Eŭropo ne plu estas certa, rusa fonto de gaso malmultekosta elsekiĝis, sennombraj homvivoj kaj gigantaj monsumoj estis vane malŝparitaj, grave malsaniĝas la germanaj industrioj kun komuna monunuo eŭropa ne plu tiom favora. La servantoj de la granda kapitalismo internacia kaj de la tradiciaj elitoj germanaj, kiel *Friedrich MERZ* kaj *Ursula VON DER LEYEN*, propagandas por grandskala rearmiĝo de Eŭropo en etoso pli kaj pli maldemokrata kaj malrusema por ke Germanio konservu sian influon. Eĉ nun laŭtiĝas voĉoj germanaj, kiuj aŭdacas kritiki la landlimojn difinitajn post la dua mondmilito kaj peti kompensojn por la tiamaj elmigrintoj germanaj.

Ĉu Germanio baldaŭ eksplodigos Eŭropan Union kaj ĝian komunan monunuon, kiuj nun ne plu certigas pacon nek prosperon promesitajn ? Ĉu ĝi starigos "kvaran Imperion germanan" por superregi centran kaj orientan Eŭropon ? Mi opinias ke vere estus timenda tiu "kvara Imperio" de Germanio denove unuiĝinta, militarisma, revenĝema kaj rifuzanta lerni el la pasinteco...

2026. 1. 5 フランス

それとも第四のドイツ帝国へか？

エリック・ベルナール・コフィネ著

2026年1月1日

アントニオ・グラムシ（1891-1937）は、「旧世界は死につつあり、新世界は誕生が遅れており、その薄明かりの中に怪物が現れる」と記した。そして彼は、「危機とは、旧世界秩序が衰退し、あらゆる反対と矛盾に直面しながら、新世界が自らを押し付けなければならない瞬間である。この過渡期には、確かに多くの過ちと苦悩が生じる」と付け加えた。今、危機の時代にあって、私たちは第四のドイツ帝国の出現を恐れるべきなのだろうか？

第一帝国（ライヒ：Reich）は、12世紀以降、東ヨーロッパのドイツによる植民地化（東方への推進力：drang nach osten）を伴った神聖ローマ帝国（962-1806）であった。ナポレオン1世によるフランス第一帝政の勝利は、その滅亡を招いた。

第二ドイツ帝国（1871-1918）は、1871年1月18日、ナポレオン3世によるフランス第二帝政に勝利した後、プロイセン周辺のドイツ諸邦を統一することで成立した。既に大規模なドイツ人コミュニティが存在していた東ヨーロッパに対する、ドイツ帝国の積極的な産業政策と汎ドイツ政策は、第一次世界大戦の勃発原因の一つとなった。1918年3月3日に調印されたブレスト＝リトフスク講和条約により、ボルシェビキ政権下のロシアは、自らが望んでいた広大な領土を一時的に割譲した。これは現在、ウクライナ、ベラルーシ、ポーランド、バルト三国、さらにはフィンランドにまで及んでいる。

1918年11月11日の休戦協定後、フランスはオーストリア＝ハンガリー帝国とオスマン帝国が解体されたのと同様に、このドイツ帝国の解体を望み、決定的に弱体化させようとした。これに対し、イギリスとアメリカの列強は反対した。両国はドイツの産業を支援し、後にソビエト社会主義共和国連邦（ソ連）と戦うためにナチズムを支持した。彼らのおかげで、休戦条件にもかかわらず、この第三ドイツ帝国（1933～1945年）は大規模な再軍備を行い、ラインラント地方を奪還し、汎ドイツ主義的な発展を継続することができた。まずオーストリア、次にチェコのズデーテン地方、そして最後に第二次世界大戦の原因となった西ポーランドに侵攻した。ソ連との戦争によって東方開発総合計画（東方総合計画）に沿ってさらに東方への発展を試みた試みは、最終的に完全に失敗し、ドイツは戦勝国によって統治される二つの国に分裂した。

西ドイツの「非ナチ化」は、実際にはニュルンベルク裁判とその後のいくつかの裁判に限られ、有罪判決を受けたのは約1万人に過ぎませんでした。英米列強は、1949年にソ連とその共産主義衛星国との「冷戦」を継続するために設立されたドイツ連邦共和国（FRG）と北大西洋条約機構（NATO）のあらゆるレベルで、元ナチス党員を部下に任命した。アメリカの植民地として築かれたヨーロッパでも同様だった。ヨーロッパの初代欧州委員会委員長、ヴァルター・ハルシュタイン（1901-1982）は、1938年にヒトラーからドイツ統治の「新ヨーロッパ」の法的基盤確立を委任された。したがって、共産主義に直面してアメリカが

支援するドイツの統治網は、何ら変わっていないのだ…。

1990年9月12日にモスクワで調印された、ドイツの西部と東部の統一に関する条約の条項によれば、ドイツは平和政策と、核兵器、生物兵器、化学兵器を持たない小規模な軍隊を持つことが求められた。また、ロシアには NATO が東方へと拡大しないことが口頭で約束されていた。ドイツは「アメリカの盾」の保護、豊富で安価なロシア産ガス、そして自国産業に有利な共通通貨のおかげで、ついにヨーロッパにおける統一性、力、そして影響力を取り戻した。

しかし、ウクライナにおけるアメリカと NATO のロシアに対する予想外の敗北により、状況は一変した。アメリカはノルドストリーム・ガスパイプラインを破壊し、ロシアに対しヨーロッパに愚かな貿易制裁を課した後、今やヨーロッパの戦場から撤退し、中国と対峙しようとしている。その結果、アメリカによるヨーロッパの保護はもはや確実ではなくなり、安価なロシア産ガスの供給源は枯渇し、無数の命と巨額の資金が無駄に浪費され、もはやそれほど有利ではなくなったヨーロッパ共通通貨によってドイツ産業は深刻な打撃を受けている。フリードリヒ・メルツやウルズラ・フォン・デア・ライエンといった巨大国際資本主義の手先と伝統的なドイツエリートたちは、ますます非民主的で反ロシア的な雰囲気の中で、ドイツの影響力を維持するために、ヨーロッパの大規模な再軍備を主張している。今もなお、第二次世界大戦後に定められた国境線を批判し、当時のドイツ人移民への補償を求める声がドイツから上がっています。

もはや約束された平和と繁栄を保証しなくなった欧州連合と共通通貨を、ドイツは間もなく崩壊させるのでしょうか？中央ヨーロッパと東ヨーロッパを支配する「第四のドイツ帝国」を樹立するのでしょうか？再び団結し、軍国主義的で、復讐心に燃え、過去から学ぶことを拒むこの「第四のドイツ帝国」は、真に恐ろしいものとなるでしょう…

2026.1.6 Nepalo

Kara Hori San,

Feliĉan Novjaron al vi kaj Tamae San!

Mi esperas, ke vi ambaŭ fartas bone.

La Esperanto-movado ĉe ni daŭras kiel antaŭe, sed nun eĉ pli vigle. Deko da infanoj jam eklernas Esperanton, kaj venontan sabaton mi kunprenos ilin al dutaga ekskurso, ĉirkaŭ 30 kilometrojn for de la Katmanda valo, en loko nomata Ĉitlang. Mi planas instrui dum du tagoj tie. Ankaŭ iliaj gepatroj partoprenos.

Ĝis nun nur kvar homoj aliĝis, do certe okazos la 15-a Internacia Himalaja Renkontiĝo. Mi esperas, ke la movado refoje plifortiĝos. La oficejo ankoraŭ funkcias, kaj mi esperas, ke ni sukcesos konservi ĝin, sed sen via helpo mi dubas. Bedaŭrinde, ne eblas daŭrigi la movadon sen mono.

La politika situacio ĝis nun estas trankvila, sed la vivkosto estas tre alta. Vivteni sin fariĝas komplike. Ŝajnas, ke baldaŭ okazos elektoj en Nepalo. Se tio okazos, la politiko reiros sur la ĝustan trakon, kaj la situacio normaligos sin. Malriĉa kaj malgranda lando kiel Nepalo estas forte influita de internacia politiko.

La situacio en Venezuelo kaj la aresto de prezidanto Maduro estas nun vigle diskutataj ĉi tie. Multaj nepalanoj pensas, ke potencaj landoj povas fari ĉion ajn al etaj kaj malriĉaj landoj, kiel Nepalo. Ni vivas ĉirkaŭitaj de gigantaj landoj. Fakte, tio, kion Usono faras en Venezuelo, ŝajnas kruela kaj kvazaŭ ĝangala leĝo en la moderna mondo. Mi pensas, ke tio estas honto por la homaro. Tial mi kredas, ke Esperanto estas des pli grava, ĉar per ĝi ni estas pli sendependaj ol multaj aliaj popoloj en la mondo. Esperanto donas al ni sendependecon, ĉu ne?

Por ĉi-foja Sumoo mi planas legi la libron “Esperanto: Lingvo, Literaturo, Movado”, verkitan de Pierre Anton. Mi legos unu paĝon tage, sed mi jam komencis. Mi gratulas vin kaj nin ĉiujn, ke ni preskaŭ atingas la centan Sumoon. Pri tio mi prelegos dum la venonta ekskurso, venontan sabaton.

Fartu bone, kara mia

Mi tre sopiras vidi vin.

Kun koraj salutoj,

Bharat

堀さんへ

あなたと玉江さん、新年おめでとうございます！

お二人ともお元気でお過ごしでしょうか。

我が国のエスペラント運動は以前と変わらず続いています、さらに活発に活動しています。すでに12人の子供もたちがエスペラントを学んでおり、来週の土曜日には、カトマンズ盆地から約30キロ離れたチトランという場所へ2日間の遠足に連れて行きます。そこで2日間教える予定です。ご両親にもご

参加いただきます。

今のところ 4 名の方しか申し込んでいませんが、第 15 回国際ヒマラヤの集いは確実に開催されます。この運動が再び大きく発展することを願っています。事務所はまだ機能しており、何とか継続できればと思っていますが、皆様のご支援がなければ難しいでしょう。残念ながら、資金がなければ運動を継続することはできません。

政情は今のところ落ち着いていますが、生活費は非常に高く、生計を立てるのが難しくなっています。ネパールでは近々選挙が行われるようです。そうすれば、政治は軌道に乗り、状況は正常化するでしょう。ネパールのような貧しく小さな国は、国際政治の影響を強く受けます。

ベネズエラ情勢とマドゥロ大統領の逮捕は、現在ここで活発に議論されています。多くのネパール人は、大国はネパールのような小さく貧しい国に対して何でもできると考えています。私たちは巨大な国に囲まれて暮らしています。実際、アメリカがベネズエラで行っていることは、現代世界の弱肉強食のように入ります。これは人類にとって恥すべきことだと思います。だからこそ、エスペラント語はより重要だと思っています。エスペラント語を通して、私たちは世界の他の多くの民族よりも自立しているからです。エスペラント語は私たちに自立を与えてくれるのではないのでしょうか。

今回のエスペラント相撲では、ピエール・アントン著『エスペラント語：言語、文学、運動』を読む予定です。1 日 1 ページずつ読み進めていきますが、すでに読み始めています。もうすぐ 100 回目の相撲を迎える皆さん、そして私たち全員を祝福します。このことについては、次の土曜日の遠足でお話しましょう。

お元気でね、あなたに会えなくてとても寂しいです。

心からお礼を申し上げます。

バーラトより

Nepalo

Karaj,

Okazis dutaga ekskurso al Ĉitlang, situanta ĉirkaŭ 30 kilometrojn for de la Katmandua Valo, organizita de NEspA la 10-an kaj 11-an de januaro 2026. La programo estis preparita kun la celo integriĝi kun naturo, kulturo kaj lingvolernado.

La programo komenciĝis per arbarmarŝado de Thankot ĝis la celloko en Ĉitlang. La vojo estis dekliva kaj trapasis densan arbaron. Ni bezonis ĉirkaŭ ses horojn por atingi la lokon. La estro de la hejmrestado, s-ro Ashok Thakuri, varme bonvenigis nin. Li estas la unua persono en Nepalo, kiu produktis kapran fromaĝon, tial la hejmrestado nomiĝas Kapra Fromaĝo Hejmrestado.

Poste okazis unuhora esperanta paroliga leciono, sekvata de joga prelego kaj praktikado gvidata de f-ino Srijana Joshi. La vicprezidanto, s-ro Punya Acharya, deklamis poemon rilatan al la nuna situacio en la lando kaj eksterlande. Poste ni manĝis, kantis kaj dancis ĝis la vespermanĝo je la 9-a horo.

La sekvan matenon oni kunvenis por la kurso je la 7:30, post matenmanĝo, kaj ĝi daŭris ĝis la 9-a horo. La praktika jogsesio ne povis okazi pro manko de taŭga spaco, tamen la instruistino kuraĝigis la ĉeestantojn praktiki ĝin poste memstare.

Je la 10-a horo la grupo vojaĝis al Markhu, ĉe la lago Indra Sarobar. Post la tagmanĝo ni revenis hejmen.

La programo estis fruktodona, ĉar ses infanoj aŭ adoleskuloj, kune kun siaj parencoj, partoprenis ĝin. La ĉeestantoj povis praktiki Esperanton nature dum la tuta ekskurso. Entute 24 personoj partoprenis la programon.

NEspA organizis ĉi tiun ekskurson por subteni kaj sukcesigi la 15-an Himalajan Renkontiĝon, kiu okazos de la 26-a de februaro ĝis la 8-a de marto 2026. Bonvolu ne malfrui aliĝi, ĉar ni bezonas pli da gastoj por garantii la sukceson de la aranĝo.

Bonvenon al Nepalo!

Sincere via,
Bharat Kumar Ghimire
Prezidanto de NEspA

Jen la detalo de la renkontiĝo :<https://www.esperanto.de/eo>

ネパール

拝啓

2026年1月10日と11日、NEspAはカトマンズ盆地から約30キロ離れたチトランへの2日間の遠足を企画しました。このプログラムは、自然、文化、そして言語学習との融合を目指して準備されました。

プログラムは、タンコットから目的地のチトランまでの森歩きから始まりました。道は険しく、深い森の中を通りました。到着まで約6時間かかりました。ホームステイのリーダーであるアショク・タクリ氏が私たちに温かく迎えてくれました。彼はネパールで初めてヤギのチーズを製造した人物であり、ホームステイの名前は「ヤギチーズ・ホームステイ」です。

その後、1時間のエスペラント語レッスンが行われ、続いてスリジャナ・ジョシ氏によるヨガの講義と練習が行われました。副会長のプニャ・アチャルヤ氏は、国内外の現状に関連した詩を朗読しました。その後、9時の夕食まで、食事をし、歌い、踊りました。

翌朝は朝食後、7時半にコースに集合し、9時まで続けました。ヨガの実践セッションは適切な場所がなかったため実施できませんでしたが、講師は参加者に後で各自で練習するよう促しました。

10時、グループはインドラ・サロバル湖畔のマルクへ移動しました。昼食後、帰宅しました。

6人の子供や10代の若者とその家族が参加してくれたため、このプログラムは実りあるものとなりました。参加者は旅行中、自然にエスペラント語を練習することができました。プログラムには合計24名が参加しました。

ネパールエスペラント協会Aは、2026年2月26日から3月8日まで開催される第15回ヒマラヤの集いを成功させるために、この遠足を企画しました。ヒマラヤの集いの成功を確実にするために、より多くの参加者が必要なため、お早めにお申し込みください。

ネパールへようこそ！

敬具 バラト・クマール・ギミレ ネパールエスペラント協会会長

ヒマラヤの集いの詳細はこちらをご覧ください：<https://www.esperanto.de/en>





Japanio

Daruma-Pupoj



Ĉi tiuj pupoj nomiĝas dharmoj. En diversaj lokoj en Japanio oni produktas siajn unikajn Dharmojn, sed la plej multe produktita estas tiu speco en la urbo Takasaki en mia gubernio Gunma. Antaŭ longe estis monaĥo nomita Bodhidharma, kiu sidis longege kruĉgambe en kaverno, provante atingi klerismon, kaj rezulte degeneris liaj brakoj kaj kruroj. En la urbo Takasaki la Dharmo-Foiro okazas la 1-an de januaro. En mia urbo, Maebashi, la Foiro okazas la 9-an de januaro.

Dharma-pupo ne havas pupilojn. Kiam vi aĉetas gⁱⁿ, vi pentras pupilon en unu okulon, kaj kiam via deziro realiĝas, vi pentras la alian en la alian okulon. Fine de la jaro, la pupoj estas bruligitaj ĉe la temploj kun sutro, kaj vi ac^{et}os la novan.

Dharma estas simbolo de persisteco al sukceso, c^{ar} gⁱ estis farita tiel, ke gⁱ neniam kus^{ig}as, c^{iam} restarig^{ante} kiel “Fali sep fojojn, leviĝi ok fojojn”

これらの人形はダルマと呼ばれています。日本では各地で独自のダルマが作られていますが、群馬県高崎市で最も多く作られているのがこのタイプのダルマです。

昔、達磨という僧侶がいました。彼は悟りを開こうと長い間洞窟の中であぐらをかいて座り続け、その結果、手足が衰えてしまいました。高崎市では1月1日にダルマ市が開かれます。私の住む前橋市では1月9日に開かれます。

ダルマには瞳がありません。ダルマを購入したら、片方の目に瞳を描き、願いが叶ったらもう片方の目に瞳を描きます。年末に寺院でダルマを経文と共に燃やし、新しいダルマ人形を買います。

ダルマは成功への忍耐の象徴です。なぜなら、ダルマは決して倒れることなく、「七転び八起き」のように常に回復するように作られているからです。

Ĉehio

Saluton sinjoro Jasuo. En Ĉehio oni úzas pupojn kiel ludiloj, kiel suveniroj, kaj en pup'teatro. Pupa teatro en malnovaj tempoj vagadis de unu foiro al dua, kaj estis formo de popola amuzo. Ofte pupoj povis diri tion, pro kio al homoj paroli malpermesis ŝtataj oficistoj. Pupoj estis spritaj, ludemaj, kantemaj kaj plejparte manfaritaj, do ĉiu pupo estis originalo. Ĉeĥa teatro Spejbl kaj Hurvínek estas malnova je 100 jarojn kaj konata en tuta Mondo. Olga

チェコ共和国

こんにちは、ヤスオさん。チェコ共和国では、人形は玩具、お土産、そして人形劇で使われています。昔、人形劇は各地の市を巡業し、大衆娯楽の一つでした。人形は、役人が口にするのを禁じていた言葉を話すこともありました。人形は機知に富み、遊び心があり、歌を歌い、ほとんどが手作りだったので、一つ一つがオリジナルでした。チェコの劇場、シュペイブル・エ・フルヴィーネクは100年の歴史を持ち、世界中で知られています。オルガ

Germanio

Kara Jasuo,

estas tre interesa moro rilate al tiuj pupoj. Sur la bildo mi eĉ ne rekonis pupojn, sed opiniis, ke temas pri vazoj.

Tiuj ankaŭ ne estas malmultekostaj. Kiun grandecon vi elektas kutime?

Restu sana!!! Amike, Ronaldo

ドイツ

ヤスオ様

この人形にはとても興味深い習慣がありますね。写真に写っている人形が何なのか全く分からず、花瓶だと思っていました。これも安くはないですね。普段はどのサイズを選ばれますか？

お元気で！ ロナウドより

Belgio

Bonan vesperon, Sinjoro Hori.

Estas tre, tre bona ideo, mi pensas : pentri sin mem unuan okulon de la pupo, kaj poste havi sian deziron, pentri sin mem la duan okulon.

Mi trovas la pupojn belajn. Se mi havus gxi, mi pensas, ke mi ne povus bruli gxin.

Viviane Tits

ベルギー

こんばんは、堀さん。

人形の片方の目を自分で塗って、もし夢が実現したらもう片方の目も自分で塗るというのは、とても良いアイデアだと思います。人形は美しいですね。もし私が持っていたとしても、絶対に燃やせないと思います。

おやすみなさい。

ヴィヴィアン・ティッツ

Esperanto kaj la japana

s-ro iŝikaua Takaŝi verkis artikolon pri Esperanto kaj la japana por iu gazeto. Vi povas legi ĝin sube:



Esperanto kaj la
japana.docx

日本人の方へ

難しすぎるので日本語訳はありません。